

# L' ESPERANTO

Monata bulteno de la Genta Esperanto-Grupo  
 Bulletin mensuel du Groupe Espérantiste Gantois  
 Maandelijksch tijdschrift van den Gentschen Esperantisten Groep.

---

REDAKCIO :

RÉDACTION :

REDACTIE :


**Michel Sebruyns**

34, Rue de Gand,

MONT-ST-AMAND

LEZ GAND.

---




---

ADMINISTRACIO :  
 kaj ANONCOJ :

ADMINISTRATION  
 et ANNONCES :

ADMINISTRATIE en  
 AANKONDIGINGEN :

**Henri Petiau**  
 60, Boul<sup>d</sup> St. Liévin  
 GAND.

---



---

**Enhavo :** Kiel pliferfektigi en nia Lingvo? - Esperanto kaj Veturado. -  
 Deko Universala Kongreso de Esperanto, Parizo. - La Ondo  
 de Esperanto. - Biblioteko. - Komerca Fako. - Komerca  
 Vortaro. - Kolektado. - Interŝanĝado.

**Sommaire :** Technique de l'Espéranto. - Cours d'Espéranto.

**Inhoud :** Tekniek van Esperanto. - Leergang van Esperanto.

---

Unu numero 0.10 fr. Le numéro 0.10 fr. Het nummer 0.10 fr.  
 Abonprezo : 1 fr. po jaro (Belgujo) 2 fr. po jaro (eksterlando)

GENTO 1913.

# L' ESPERANTO

Monata bulteno de la Genta Esperanto-Grupo.

Redakcio :

MICHEL SEBRUYNS

RUE DE GAND 34, M<sup>l</sup>S<sup>t</sup> AMAND (Gand.)

Administracio kaj Anoncoj :

HENRI PETIAU

60, BOULEVARD ST. LIÉVIN, GAND.

Ne presitan manuskripton oni ne resendas. La redakcio konservas por si la rajton korekti laŭbezone la manuskripton.

Por ĉio, kio koncernas la redakcion, sin turni eksklusive al la ĉefredaktoro S<sup>ro</sup> M. SEBRUYNS, 34, Rue de Gand, Mont St. Amand, (Gand.)

## Technique de l'Espéranto.

(suite)

N'oublions pas qu'une langue artificielle est indéfiniment perfectible. Toutes les bonnes règles, formes, ou expressions qui se trouvent dans toute autre langue, elle se les attribue de plein droit; tout défaut qui pourrait se rencontrer en elle, elle a le droit de l'améliorer, de le changer; tandis que, dans une langue naturelle rien de semblable ne peut exister.

Nous avons dit que l'Espéranto était une langue exclusivement phonétique, ce qui résout d'une façon absolue cette terrible difficulté de l'orthographe, si abominable dans la plupart des langues, où la prononciation et l'orthographe sont tellement en désaccord que beaucoup de bons esprits n'ont pu s'empêcher d'en être profondément choqués.

Il est, au contraire, tout naturel qu'un linguiste éminent comme Zamenhof, qui vient de créer une nouvelle langue, la codifie, dès sa naissance, comme il l'entend, en lui supprimant tous les défauts qu'il a remarqués dans les autres langues vivantes, et en lui donnant, par définition, cette qualité primordiale, d'être entièrement phonétique, de telle manière que toutes les lettres se

## Teknik van Esperanto.

(vervolg)

Vergeten wij niet, dat eene kunstmatige taal oneindig verbeterbaar is. Al de goede regels, vormen en uitdrukkingen, die in welkdanige andere taal te vinden zijn eigent zij zich toe in volle recht; welkdanig gebrek er zou kunnen in voorkomen, heeft zij het recht te verbeteren of te veranderen; terwijl, in eene natuurlijke taal, niets dergelijks zou kunnen bestaan.

Wij hebben gezegd, dat Esperanto eene uitsluitend fonetische taal is, hetgeen op eene volstreckte wijze die schrikkelijke moeilijkheid van schrijfwijze oplost, zoo afschuwelijk in het meerendeel der talen, waar de uitspraak en de schrijfwijze zoodanig tegenstrijdig zijn dat vele goede verstanden er door geschokt zijn geweest.

Het is intendeel, zeer natuurlijk dat een uitmuntende taalkenner, zooals Zamenhof, die de schepper is van Esperanto, deze van af hare geboorte aan vaste wetten onderwerpt, welke hem goed schijnen, en haar van af de gebreken zuivert, die hij in de andere levende talen gevonden heeft, en haar, door bepaling, die allereerste en allernoodzakelijkste hoedanigheid toekent, van gansch fonetisch te zijn, zoodanig dat al de letters altijd op dezelfde

prononcent toujours de la même façon, et comme elles sont prononcées dans l'alphabet même de la langue.

Un illettré, en effet, ne comprendra jamais pourquoi automobile ne s'écrit pas *otomobil*, orthographe, *ortograf*, pomme-de-terre, *pom-de-ter*, etc.

L'Espérantiste résonne comme l'illettré : si celui-ci avait, comme langue maternelle, l'Espéranto, il ne ferait jamais de fautes d'orthographe : *la faute d'orthographe en Espéranto, est impossible* ; à moins qu'on ne prononce le mot d'une façon défectueuse ; mais, si le mot est prononcé correctement, il ne peut être mal orthographié. C'est ainsi que le Dr Zamenhof a supprimé complètement l'e muet, et les syllabes muettes, cause de tant d'erreurs.

Chose extraordinaire, l'Espéranto est à la fois *la plus riche des langues, et celle qui vous impose le moins de mots à apprendre*. Dans presque toutes les langues, vous pouvez mettre en fait, que, sur 10 mots qu'on vous fait apprendre, il y a en a au moins 9 que vous apprenez inutilement. Le nombre des racines (si l'on rapportait, comme on le doit, tous les mots à leur racine génératrice), est, en fait, extrêmement réduit.

Je vais tâcher de prendre quelques exemples pour bien vous le montrer.

Prenons, par exemple, en Français : bœuf, vache, veau ; 3 mots, et 3 racines bien différentes.

Voilà pour l'étranger, 3 mots à apprendre : c'est un grand tort ; il y en a deux d'inutiles ; car tout cela, c'est toujours l'espèce bœuf ; l'Espéranto résout, de la façon la plus simple, au moyen des suffixes, cette réduction du nombre de racines. L'Espérantiste appelle le bœuf, *bovo* ; la vache *bov-in-o* ; (in, suffixe, indique la femelle) et le veau *bov-id-o* ; id, (suffixe, indique l'enfant).

De même, si nous disons en Espéranto : *ĉevalo, ĉeval-in-o, ĉeval-id-o* ; ce sont le cheval, la jument, le poulain ; et ainsi de suite. Ces suffixes, qui peuvent modifier, de quantités de façons, le sens des mots, sont la merveille de l'Espéranto, et un des secrets de la prodigieuse économie de mots (à apprendre) qui en résulte. Prenons, par exemple, le mot *Kudri*, qui veut dire

wijze worden uitgesproken, en met den klank hun door het alphabet toegekend.

Een ongeleerde, inderdaad, zal nooit begrijpen, waarom de lange klinkers nu eens enkel, dan eens dubbel geschreven worden. Waarom *ijzer* met ij en *eigen* met ei. En zoo vele andere op niets gesteunde eigenaardigheden.

Het Esperanto redeneert zooals de ongeleerde mensch : indien hij, als moedertaal, Esperanto had, zou hij nooit spellfouten kunnen schrijven : *de spellfout in Esperanto is onmogelijk* ; tenzij men het woord op eene gebrekkige manier uitsprak : maar, wordt het woord onberispelijk uitgesproken, kan het onmogelijk slecht geschreven worden. Zoo heeft b. v. Zamenhof de toonlooze E totaal afgeschaff, evenals de toonlooze lettergrepen, oorzaak van zoovele dwalingen.

En wonderbaar, 't Esperanto is te zelfdertijd *de rijkste der talen, alhoewel zij u het aanleeren van 't minste getal woorden oplegt*. In bijna al de talen geldt deze grondstelling, dat, op 10 woorden die gij verplicht zijt aan te leeren, er 9 overbodig zijn. Het getal grondwoorden (wel te verstaan, zoo men, zooals het behoort, al de woorden terugbracht tot het zoogenoemde : moeders-tamwoord) is inderdaad, oneindig beperkt.

Verklaren wij dit door eenige voorbeelden.

Nemen wij b. v. in 't Vlaamsch de 3 wel onderscheide woorden en tezelfdertijd : stamwoorden : *Os, koe, kalf*.

Een vreemdeling, die onze taal leert, moet 3 woorden aanleeren ; 't is een groot ongelijk want er zijn er twee te veel ; want 't is altijd 't gedacht os dat bovenzweemt ; Esperanto lost die kwestie van het beperken der grondwoorden, op de eenvoudigste wijze op, bij middel van voor- en achtervoegsels. De Esperantist noemt den os, *bovo* ; de koe *bov-in-o* (in, achtervoegsel dat het wijfje aanduidt) en het kalf, *bov-id-o* (id, achtervoegsel, dat den afstammeling, het kind, het jong aanduidt.)

Evenzoo noemen wij in Esperanto het paard, de merrie en het veulen : *ĉevalo, ĉeval-in-o, ĉeval-id-o*, enz.

Die bijzetsels, die op verscheidene manieren den zin der woorden kunnen wijzigen, maken een echt wonder uit in Esperanto, en

« coudre ». Si on le termine par le suffixe *il* (instrument), nous avons *Kudrilo*, instrument à coudre ; aiguille ; avec le suffixe *ist*, indiquant la profession, nous avons : *Kudristo* [couleurier] *Kudr-ist-in-o* (couturière). Prenons encore : *Pentri* (peindre) ; nous en tirons *Pentri-il-o* [pinceau], *Pentri-ist-o* [peintre], *Pentri-aj-o*, atelier de peinture (*aj*, suffixe indiquant le lieu affecté à), *Pentri-ai-o* (tableau), etc. etc. *Lerni* : apprendre, nous donnera *lern-ist-o*, étudiant ; *lern-aj-o*, école, etc., etc.

*Arbo*, arbre ; *Arb-ar-o*, réunion d'arbres, forêt.

*Vorto*, mot ; *Vort-ar-o*, vocabulaire, (réunion de mots)

Prenons encore : *Vento*, vent ; d'où on fera *vent-el-o* (brise) *vent-eg-o* (tempête).

Le suffixe *et*, (ci-dessus), indique le diminutif. Nous le retrouvons dans un grand nombre de mots français, comme voiturette, fillette, etc., seulement, au contraire de l'Espéranto, où il peut s'appliquer à tous les mots de la langue, il ne s'applique, en français, qu'à certains mots arbitrairement choisis.

Le suffixe *eg* exprime l'idée « d'augmentatif » ; avec *pluvo*, pluie, nous pourrions former *pluv-eg-o* que nous ne pouvons rendre que par pluie torrentielle, etc.

[à suivre.]

[t vervolgt]

## Cours d'Espéranto

Corrigé de la Traduction de la 9<sup>e</sup> Leçon.

1. On annonça par la presse, que le mariage aura lieu demain. 2. On a renversé le sel sur la table, nettoyez-la. 3. Je dois ma guérison aux remèdes du médecin. 4. On décapitera l'assassin du sénateur. 5. L'aversé ne durera pas longtemps, voilà qu'elle cesse déjà. 6. En forgeant on devient forgeron. 7. M<sup>r</sup> et M<sup>e</sup> N.,,

zijn één der geheimen van de wonderbare besparing der te leeren woorden, die er uit voortvloeit. Nemen wij b. v. het woord *kudri*, dat beteekent « naaien ». Indien men er het achtervoegsel « *il* », [het werktuig] bijvoegt, bekomt men *kudrilo*, werktuig om te naaien, naald ; met het achtervoegsel *ist* [duidt den stieldoener aan] hebben wij : *kudristo*, naaier ; *kudr-ist-in-o*, naaister.

Nemen wij nog *Pentri* (schilderen) daaruit leiden wij af : *pentri-il-o*, schilderborstel ; *pentri-ist-o*, schilder ; *pentri-aj-o*, schilderwerkhuys, *aj* duidt aan : de plaats bestemd tot *pentri-aj-o*, schildderij, enz. enz.

*Lerni*, leeren, geeft *lern-ist-o* student *lern-aj-o*, school.

*Arbo*, boom, geeft *arb-ar-o* bosch ; (*ar* duidt de verzameling aan) *arb-et-o*, boompje.

*Vento*, wind ; daaruit maken wij *vent-et-o* windje, zefter, bries ; en *vent-eg-o* zeer groote wind, storm.

Het achtervoegsel *et* dient als verkleinwoord, maar in tegenstelling met het Fransch, waar wij het slechts in een zeer beperkt getal woorden terugvinden, is het op alle woorden toepasselijk.

*Eg* duidt den hoogsten graad aan : b. v. *pluvo* regen, van daar *pluv-ego* stortregen.

## Leergang van Esperanto

Verbetering der Oefening op de 9<sup>e</sup> Les.

1. Door de drukpers maakte men kenbaar, dat het huwelijk morgen zal plaats hebben. 2. Men heeft het zout op de tafel gestort, vaag ze af. 3. Ik ben mijne genezing verschuldigd aan de uitmuntende geneesmiddelen des dokters. 4. Men zal den moordenaar des senators onthoofden. 5. De stortvloed zal niet lang duren, daar houdt ze al op. 6. Al smedende,

instituteur et institutrice, sont des personnes charitables. 8. Le jury se réunira demain. 9. Sais-tu, si le vétérinaire viendra demain? 10. Voici les poules mortes (intrans.) 11. Commençons, je bois à la santé de mes invités. 12. En s'effondrant, la chapelle tua beaucoup d'assistants.

wordt men smid. 7. M<sup>r</sup> en M<sup>e</sup>, onderwijzer en onderwijzeres, zijn liefdadige personen. 8. De jury zal morgen vergaderen. 9. Weet gij, of de veearts morgen zal komen? 10. Zie daar de doode kiekens! 11. Dischenooten, ik drink op de gezondheid van mijne uitgenoodigden. 12. Al instortende, doodde de kapel vele omstaanders.

10<sup>e</sup> LEÇON

10<sup>e</sup> LES

Temps composés.

Samengestelde Tijden.

Les temps composés, tant à la forme passive qu'à la forme active, se forment à l'aide des temps simples du verbe ESTI et les participes des verbes.

De samengestelde tijden, zoowel in den bedrijvenden als in den lijdenden vorm, worden gevormd bij middel van de enkelvoudige tijden van 't werkwoord ESTI en de verleden deelwoorden der werkwoorden.

Ex.-Voorb. — La pordo estas fermata (la porte est fermée, occupée à être fermée-de deur wordt gesloten).

La pordo estas fermata (la porte est fermée-de deur is gesloten).

Mi estis vojaĝinta (j'avais voyagé-ik had gereisd).

Estu estintaj saĝaj (avez été sages-zijt braaf geweest).

Ŝi estus lerninta sian lecionon, se... (elle aurait appris sa leçon. si...-zij zou hare les geleerd hebben, indien...)

La ŝtelistoj estos ekzekutataj morgaŭ (les voleurs seront exécutés demain-de dieven zullen morgen gehalsrecht worden).

REMARQUE :

BEMERKING :

Les mots DE ou PAR qui précèdent en Français le complément du verbe passif, se traduisent par DE.

De woorden DOOR of VAN die de bepaling van 't lijdend werkwoord in 't Vlaamsch voorafgaan, worden vertaald door DE.

Ex.-Voorb. — Ŝi estas amata de ĉiuj [elle est aimée de tous-zij wordt van allen bemind]; Vi estos batata de via patro (tu seras battu par ton père-gij zult door uwen vader geslagen worden).

Accusatif de temps, date, mesure et prix.

Accusatif van tijd, datum, maat en prijs.

Au lieu d'une préposition, on peut

Men mag, in plaats van een voor-

facultativement employer l'accusatif dans les compliments, exprimant : 1<sup>o</sup> la date, 2<sup>o</sup> le moment ou la durée de l'action, 3<sup>o</sup> la mesure, 4<sup>o</sup> le prix.

zetsel, naar willekeur den accusatif gebruiken, in de bepalingen, die uitdrukken : 1<sup>o</sup> den datum, 2<sup>o</sup> den oogenblik of den duur der handeling, 3<sup>o</sup> de maat, 4<sup>o</sup> den prijs.

Ex.-Voorb. — Venu la venontan semajnon (venez la semaine prochaine- komt de toekomstige week).

La hundo kostis 10 frankojn (le chien a coûté 10 fr.- de hond heeft 10 fr. gekost).

L'Élision.

De Afkapping.

L'élision se pratique couramment, mais seulement pour l'a de l'article la.

De afkapping wordt algemeen gebruikt, maar is slechts toegelaten voor de a van 't lidwoord la.

Ex.-Voorb. — Je l'kvara (vers 4 h<sup>s</sup>-rond den viere); De l'prezidanto (du président-des voorzitters); Antaŭ l'ponto (devant le pont-vóór de brug).

L'o du substantif ne peut se supprimer qu'en poésie.

De o van 't naamwoord mag alleenlijk in poësie weggelaten worden.

Ex.-Voorb. —

Ĉiuloke tra la ter,

Brilu la stel' de l'esper!

(Que partout sur la terre, brille l'étoile de l'Espérance-Dat overal op gansch de aarde, de ster der hoop schittere!)

\* \* \*

Emploi de "Kiu" et "Kia"

Gebruik van "Kiu", en "Kia",

Le mot quel se traduit par kia lorsqu'il veut dire « quelle sorte de » « quelle espèce de ».

Het woord welk of wat wordt vertaald door kia, als 't beteekent « wat soort van » « wat slag van ».

Ex.-Voorb. — Kia besto estas la leono (quelle bête est le lion?-wat voor een dier is de leeuw?) Kian vinon vi trinkos (quel vin boirez-vous?-welken wijn drinkt gij?)

Dans les autres cas il se traduit toujours par kiu.

In al de andere gevallen, wordt het vertaald door kiu.

Ex.-Voorb. — Kiun tagon ni havas hodiaŭ (quel jour avons-nous aujourd'hui?-wat dag hebben wij heden?)

Mi ne scias kiun ĉevalon mi devas jungi (je ne sais pas quel cheval je dois atteler-ik weet niet welk paard ik moet inspannen)

Vocabulaire.

Woordenlijst.

Kelnero (garçon de café-kelner); Grado (degré-graad); Vetero (temps, température-weder); Anverpeno (Anvers-Antwerpen); Akeno (Aix-la-Chapelle-Aachen); Ŝtofo (Etoffe-stof, goed); Ŝangi (changer-veranderen); Komuniki (communiquer-mededeelen); Forgesi (oublier-vergeten); Mensogi (mentir-liegen); Eviti (éviter-vermijden); Nenia (aucun, nul-geen, niet een); Alta (haut-hoog); Larĝa (large-breed); Grava (important-belangrijk); Tamen (cependant-nochtans); Po (à raison de-in evenredigheid van); Nenies (à personne, de personne-niemand); Neniu (personne, nul-niemand, niet één); Nenie (nulle part-nergens); Maŝino (machine-machien); Festeno (festin, banquet-banquet); Armeo (armée-leger); Admiri (admirer-bewonderen); Adori (adorer-aanbidden); Preferi (préférer-verkiezen, liever hebben); Bedaŭri (regretter-betreurén); Diskuti (discuter-betwisren); Ŝati (estimer-schatten); Respekti (respecter-eerbiedigen); Etendi (étendre-uitrekken, uitsteken, uitspreiden); Fleksi (fléchir-buigen); Kalkuli (calculer-rekenen); Dividi (diviser-verdeelen); Prokrasti (remettre-uitstellen, verdagen); Tuŝi (toucher-aanraken); Kompati (compatir-medelijden hebben); Frue (tôt-vroeg).

Traduction.

Vertaling.

1. Kian vinon vi estis trinkintaj? 2. Tiu bongusta kaj freŝa biero kostas nur 10 centimojn po glaso. 3. Kiun tagon vi efektos por veni Akenon? 4. Kia viro li estas? 5. Nia bonega patrino estis ŝatata sian tutan vivon. 6. Estu skribintaj kiam mi revenos. 7. Ni estus estintaj malsanaj, se ni estus trinkintaj tian bieron. 8. La infano estos ree batata de sia kruela patro. 9. Kiam mi estis interparolinta unu horon kun la juĝisto, mi foriris. 10. La festeno estus okazinta Dimanĉon, se ĝi ne estus prokrastata. 11. Se vi estus vidintaj la mizerulojn, vi estus estintaj kortuŝataj. 12. La viando troviĝas sur la tablo, ĝi estas mangota; ni manĝas ĝin, do ĝi estas mangata; poste ĝi estos mangita.



## Kiel pliferfektigi en nia Lingvo?

Multaj Esperantistoj plendas, ke ili ne sufiĉe konas la lingvon. "Ni sekvis „ ili diras, «kurson kompletan el dek, dekdu aŭ dekkvin lecionoj, sed tio helpas al ni nur por iom koni la gramatikon, sed kiam ni bezonas iom ilue paroli la lingvon, tio ne sukcesas. Kaj riproĉeme ili aldonas: «Oni pretendas ke Esperanto estas tiel facile, ke oni povas ĝin sufiĉe bone paroli

post 4-6 monatoj! Nu, tio ne estas vere: ni sekvis jam de tiom da monatoj kursojn, kaj ankoraŭ ĉiam timas esti alparolata de iom lerta samideano!»

Kiam iu pretendas ke Esperanto estas tre facila, ke oni povas ĝin ellerni en la tempospaco de 3, 4 ĝis ses monatoj, ke post dekduo da lecionoj oni estas kapabla ĝin kompreni, legi, skribi, kaj sufiĉe ilue paroli, tiam li tute ne mensogas! Tio-ĉi estas jam milfoje pruvita; multaj el ni spertis tion kaj estas sufiĉe da vivantaj pruvoj pri tiu aserto.

Sed, estas lerni, kaj lerni.

Aro da personoj, kiuj sentas inklinon al Esperanto, decidas lerni ĝin sed, tial ke ili aŭdatis multe pri ĝia facileco kaj simpleco, il iras al kurso kun la falsa ideo ke sufiĉas «sekvi» ĝin t. e.: ĉeesti kaj aŭskulti, kvazaŭ maŝine, kvazaŭ aŭtomate en la ĉambrego, kaj opinias ke ili faris jam pli ol necese kiam ili ne babiladis aŭ dormis dum la leciono. Ili tiamaniere «sekvas» dek, au dudek, da lecionoj, kaj post tio serio ili estas tute mirigitaj, tial ke ili ne estas perfektaj esperantistoj.

Ne, tia rezultato estas necvitebla kaj tia sekvado de kurso pli malutilas ol utilas al nia movado, ĉar ĝi utilas nur por instigi al malsimpatio kontraŭ Esperanto.



Nu, ĉar mi parolas al geamikoj, kiuj estas ĉiuj veraj, sinceraj kaj laboremaj gesamideanoj, mi parolu al ili nekaŝeme, iom pli grave ol al neesperantistoj, al la profanuloj.

Ĉiamaniere, ĉiam, ĉie, ĉiel vi aŭdas, vidas, legas ke Esperanto estas facila; ĉu tio estas vere? Jes, tre facile, ege facile! Sed tiu facileco estas nur rilate al aliaj lingvoj. Efektive la malmulteco de ĝiaj gramatikaj reguloj, la malgrandnombro de ĝiaj radikvortoj, la simpleco de la derivado kaj kunmetado, ĉio tio-ĉi pravas tion. Sed tamen, malgraŭ tiu mirinda facileco kaj simpleco oni devas ĝin studi kun la sama seriozeco, metodo kaj atenteco kiel por la ceteraj lingvoj.

Estas tute alia afero ol ekzemple lerni rajdi, biciklete, danci polkon aŭ ludi «diabolon». Por tio-ĉi ekzercadoj vi renkontos personoj kiuj je la unua provo sufiĉe bone sukcesas kaj post tri, kvar fojoj estas sufiĉe lertaj biciklistoj, polkodancantoj aŭ diabololudantoj.

Tio ne ekzistas por la akirado de Lingvo, eĉ de nia tiom simpla kaj facila Esperanto. Unu havas tamen pli bonan memoro ol al alia; unu pli rapide komprenas ol la alia; unu aplikas pli lerte ian regulon ol alia; unu ellernas pli grandan kvanton da vortoj en la sama tempospaco ol la alia, sed tio-ĉi ne forprenas, ke estas necese studi Esperanto laŭmetode kaj aplikante la regulojn, kiuj taŭgas je aliaj sciencoj.

Tiel ekzemple estas nepre necese la ripetado. Ni devas relegi, retravidi, eĉ restudadi hejme la lecionon de la profesoro. Se ne vi ne bone komprenas

la malfacilaĵojn de la pasinta leciono, tiuj de la sekva kuniĝas kaj vi troviĝas antaŭ multaj malfacilaĵoj solvotaj. Tiamaniere oni antaŭteniras necviteble al hoaso je la finiĝo de la kurso; ĉio dancas konfuzite antaŭ niaj okuloj: gramatikaj reguloj, prefiksoj, afiksoj, vortfarado, vortdeveno, kunmetitaj tempoj, k. t. p. Tiu estas la kaŭzo de la forlaso de tiom da lernantoj: la lingvo malplaĉas al ili: anstataŭ ol komdamni sin mem ili alskribas la kulpon al nia lingvo, kvankam la sukcesoj kaj progresoj de la serioze studemaj gelnantoj pruvas al ili la kontraŭon.

Kiam oni estas do sekvinta kurson laŭ la supredirita maniero, ĉu oni ne plu bezonas ion fari por plilertigi, pli perfektigi en nia lingvo? Kontraŭe, tiam nur komenciĝas la periodo de perfektigo!

Pro la facileco kaj simpleco de Esperanto, oni ĝin forgesas pli malrapide ol alian sciencan aŭ lingvon, sed tamen, kiam oni malzorgas, post la kurso, la praktikadon, oni ĝin fine forgesos. Kion do fari?

Relegu ofte kaj atente la regulojn de la lecionoj. Ili estas malmultaj kaj mallongaj, sed ĝuste pro tio, ĉiu vorto havas sian gravecon: mi kuraĝas eĉ konsili, ke oni ilin lernu parkere! Tiamaniere la reguloj kvazaŭ enradikiĝos en vian memoron, vi al kutimiĝos al ili, ili tuj avertos vin, kiam vi faros erarojn kontraŭ ili.

Dua afero: legu multe! La legado estas la necesega paŝo por fariĝi bona Esperantisto: dum ĝi, oni povas fari trankvile, malrapide, metode la dismetadon de la vortoj, rememori la aplikitajn regulojn, korekti kaj plibonigi la akcentadon kaj elparoladon, al kutimiĝi al la skribmaniero, k. t. p. Ĉio tio ne estas ebla al ni dum ni parolas.

Do legu, legu, geamikoj! Ni havas tre interesan kaj jam tre riĉan bibliotekon; nia bibliotekisto, tre servema, tre ordema, tre agema, tre gentila, havigos al vi ĉion, kion vi deziras. Superŝutu lin per petoj pri libroj!

Legu originalaĵojn Esperantajn, por kutimiĝi je la esperanta stilo; legu tradukaĵojn: kia bonega okazo por la literaturamantoj (ĉiuj Esperantistoj estas tio, ĉu ne?) por konatiĝi kun la verkoj de la ĉiumondpartaj ellandaj literaturistoj!

\* Sed » vi diros, « mi ne havas sufiĉe da tempo por legi! » Ĉiu havas tempon, kiam li volas! Legu sur la strato, en la vagonaro, en la tramveturilo, dum promenado, en la lito, kiam la dormado ne volas veni, k. t. p.!

Ni skribu esperanton! Kiu el ni ne skribas multfoje tage? Notoj, impresoj, adresoj, mendoj, memorigiloj, en - kaj elspezoj, ĉion tion ĉi ni skribu esperante! Kiam ni redaktas leteron (am - komerca - aŭ alispeca letero) ni faru tion malnete per Esperanto, kaj ĝin transskribante, ni havas duan profiton lernigan per la traduko en nacia lingvo.

Sed la ĉefa rimedo por akiri lertecon en Esperanto estas la parolado! Ni ĉiam kaj ĉie parolu Esperante! Eĉ kiam ni estas solaj, ni povas paroli al ni mem: la bona flanko de tiu-ĉi ekzercado estas, ke neniu atidas niajn

erarojn, kaj do ni ne bezonas ruĝiĝi! Sed precipe ni parolu Esperante kun niaj gesamideanoj, dum la kunvenoj, promenadoj, ekskursoj, k. t. p. Kaj tiam ni ne timu, ni kuraĝu eldiri tion, kion ni pensas; se ni eraros, estos pli lertaj geamikoj, kiuj vin korektos! Ni sentime pretendas, ke unu horo da parolado estas pli lerniga ol tuta tago da alimaniere studado!

\* \* \*

Mi resumas: se vi volas fariĝi lerta Esperantisto: ripetu la lecionojn, legu multe, skribu multe sed precipe parolu multe nian karan lingvon!

SPERTINTO.



## ESPERANTO KAJ VETURADO.

Vizitantoj al Granda Britujo, ĉu por komerco, ĉu por plezuro, estas konsilataj konigi kun Nordorienta Anglujo, kiu proporcie estas la laborejo kaj ludejo de Anglujo.

Oni invitas la vojaĝantojn konsulti la komercan Agenton (Nord Eastern Railway, York) pri ĉiu demando rilate la pli igadon de komerco.

La ĉefloko de la kompanio sidas en York, kiu estas ankaŭ la ĉefa centro por fervojoj en la Nordo de Anglujo. oni atingas ĝin el Rotterdam kaj Zeebrugge tra la haveno Hull. La marveturado de tiuj linioj estas tute moderna kaj pli malkara ol aliaj.

Rilate al Granda Britujo, la « Nord Eastern Railway » estis la unua Fervoja Kompanio, kiu akceptis Esperanton kiel elementon de moderna vivo. La Kompanio preparis kaj senpage eldonis ilustritan libron pri la tie bela pejzaĝo, kiu trapasas ĝia linio. Tiu eldonaĵo, presita Esperante kaj Angle, estis disdonata dum la Esperanta Semajno de Gento.

*Esperantistoj! Favorizu la magazenojn kaj personojn, kiuj anoncas en nia "Bulteno" kaj diru al la vendistoj, ke vi estas Esperantistoj!*

# Deka Universala Kongreso de ESPERANTO

PARIS — 2-10 Aŭgusto 1914 — PARIS

## CIRKULERO 2<sup>a</sup> (1)

Por ke la « Deka » bone sukcesu, estas nepre necese, ke la Organiza Komitato sciigu, kiel eble plej baldaŭ, pri la nombro de la Kongresanoj.

Pri tio, tuj konigu al la Komitato vian aliĝon laŭ jena adreso:

### DEKA KONGRESO DE ESPERANTO

3, place Jussieu, 3.

PARIS, France.

Kune sendu vian kotizon per postmandato, ĉeko aŭ transpagilo.

### ATENTU!

Ĝis la 1 de Junio 1914, tiu kotizo estos 15 frankoj (10 frankoj por familianoj: edzino kaj infanoj.)

Post la 1 de Junio 1914, tiu kotizo estos 25 frankoj (20 frankoj por familianoj.)

Eĉ se vi ne estas certa, ke vi povos veni al la Kongreso, tamen tuj aliĝu, ĉar se vi ne ĉestos, oni repagos al vi vian antaŭpagitan kotizon, deprenante nur unu frankon por oficejaj elspezoj. Sufiĉos ke vi tion petos, sendante vian provizoran karton, antaŭ la 1 de Aŭgusto 1914.

Sekve, nenion riskante, vi ricevos grandan profiton, se vi aliĝos antaŭ la 1 de Junio de 1914. Sed vi ricevos pli grandan profiton, se vi aliĝos kiel eble plej baldaŭ, ĉar la ĉiunmonatan Kongresan Gazeton, ĉiu kongresano (escepte la familianoj) ricevos senpage nur depost la tago de sia aliĝo.

La unua numero aperos la 1 de Januaro 1914, kaj ĝin ricevos nur la Kongresanoj kies aliĝojn ni estos ricevintaj antaŭ la 31 de Decembro 1913. Ĉar ni presigos precize la sufiĉan nombron da ekzempleroj, al Kongresano kies aliĝon ni ricevos ekzemple en Marta, ni sendos la Kongresan Gazeton nur de la 1 de Aprilo.

### Rimarko!

Se vi havas presitan aliĝilon, uzu ĝin por sendi vian aliĝon; tio estas preferinda, sed ne necesa.

LA ORGANIZA KOMITATO DE LA DEKA.

(1) La cirkulero traktis pri la Garantia Kapitalo kaj estas sendite nur al francaj samideanoj.

# “ LA ONDO DE ESPERANTO ”

MONATA ILUSTRATA REVUO

(fondita en la jaro 1909)

## Ĉiu abonanto de la jaro 1914,

krom 12 n-roj de l'gazeto, — ricevos donace belan Esper. libron:

### Esperanta Poŝkalendaro por la jaro 1915

« La Ondo » aperas akurate la 1-an daton, novstile. Ĉiu n-ro havas 16-24 pag. Formato 17×26. Bela kovrilo.

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Nia lanterno. (kontraŭ **Ido**). Amuza fako (kun premioj). Anekdotaro. Koresponda tutmonda. (Poŝt. ilustr.)

### Anonco en « Koresp. Fako » — 3 respondkuponoj

La abonpagon (2 rubl. = 2.120 sm.) oni sendu al librejo « Esperanto » (Moskvo, Lubjanskij proezd, 3, Ruslando) aŭ al aliaj Esper. librejoj: poŝtmandate, respondkupone, papermone, per bankĉekoj aŭ per transpag. de Esp. ĉekbanko.

## BIBLIOTEKO.

La sekvantaj broŝuroj, ĵurnaloj, k. t. p. estas je la dispono de niaj anoj:

- (Daŭrigo)
- |     |   |  |               |
|-----|---|--|---------------|
| 67. | <i>L'Esperanto</i> , monata Genta bulteno: 1 <sup>a</sup> jaro, n <sup>o</sup> 5. | Majo   | 1913.         |
| 68. | <i>Takomo</i> , priskribo de la urbo Takomo en Washington                         |  |               |
|     |   | (Donacis: S <sup>o</sup> Sebruyus, Mt-St-Amand.) |               |
| 69. | <i>La Revuo</i> , internacia monata revuo: 7 <sup>a</sup> jaro, n <sup>o</sup> 7. | Marto  | 1913.         |
| 70. | »   | n <sup>o</sup> 8                                 | Aprilo        |
| 71. | »   | n <sup>o</sup> 9                                 | Majo          |
| 72. | <i>Kaatje</i> , teatraĵo: Flandre verkis: Paul Spaak.                             |  |               |
|     | Esperantigis: D. <sup>o</sup> W. Van der Biest.                                   |  |               |
|     | (Donacis: S. <sup>o</sup> H. Peliau, Gent).                                       |  |               |
| 73. | <i>Belga Esperantisto</i> , monata revuo: 5 <sup>a</sup> jaro, n <sup>o</sup> 6.  | Aprilo   | 1913.         |
| 74. | »   | n <sup>o</sup> 7                                 | Majo          |
|     |   | 1 Novembro                                       | 1908.         |
| 75. | <i>Belga Esperantisto</i> , monata revuo: 1 <sup>a</sup> jaro, n <sup>o</sup> 2.  | Decembro   |               |
|     | (Donacis: S. <sup>o</sup> E. Weysser, Antwerpen).                                 |  |               |
| 76. | »   | 1 <sup>a</sup> jaro, n <sup>o</sup> 3.           | Januaro 1909. |
|     | (Donacis: S. <sup>o</sup> E. Weysser, Antwerpen).                                 |  |               |

77. » » 1<sup>a</sup> jaro, n<sup>o</sup> 4 Februaro 1909.  
(Donacis : S<sup>o</sup> E. Weysser, Antwerpen).
78. » » 1<sup>a</sup> jaro, n<sup>o</sup> 7 Majo 1909.  
(Donacis : S<sup>o</sup> E. Weysser, Antwerpen).
79. » » 1<sup>a</sup> jaro, n<sup>o</sup> 11 Septembro 1909.  
12 Octobro 1909.  
(Donacis : S<sup>o</sup> E. Weysser, Antwerpen).
80. *Internacia Muzeo*, noto kaj resuma katalogo, » » »
81. *Oficiala Gazeto Esperantista*, monata gazeto : 4<sup>a</sup> jaro, n<sup>o</sup> 1, 25 Junio 1911.  
(Donacis : S<sup>o</sup> E. Weysser, Antwerpen).
82. » » » 5<sup>a</sup> jaro, » » 1912.  
(Donacis : S<sup>o</sup> E. Weysser, Antwerpen).
83. *La kroniko*, tutmonda revuo : 1<sup>a</sup> jaro, n<sup>o</sup> 1, Julio 1911.  
(Donacis : S<sup>o</sup> E. Weysser, Antwerpen).
84. *Historio de la Komunumo de Laon*, France verkis : Augustin Thierry.  
Esperantigis : René Deshays.  
(Donacis : E. Weysser, Antwerpen).
85. *Kongreso Parolado de D<sup>o</sup> L. L. Zamenhof en Washington*.  
(Donacis : S<sup>o</sup> E. Weysser, Antwerpen).
86. *Peomaro*, Tiflisano » » »
87. *Gvidlibreto de Edinburgo*, J. Robbie F. B. E. A.  
(Donacis : Foj Hunter, Edinburgh).
88. *Kurso pri Teologio* : Verkis : Le Clément de St-Marcq,  
Esperantigis : A. Stas.  
(Donacis : F<sup>o</sup> Schepens, Gent.)
89. *L'Esperanto*, monata Genta bulteno, 1<sup>a</sup> jaro, n<sup>o</sup> 6, Junio 1913.
90. » » » n<sup>o</sup> 7, Julio 1913.
91. *The British Esperantist*, brita monata revuo, vol<sup>o</sup> IX, n<sup>o</sup> 103, Julio 1913.  
(Donacis : S<sup>o</sup> J. H. Fitton, Huddersfield).
92. *Belga Esperantisto*, monata revuo, 5<sup>a</sup> jaro, n<sup>o</sup> 8, Junio 1913
93. *Rikke-tikke-tak*, romano, Flandre verkis : Henriko Conscience.  
Esperantigis : Maria Posenaer.  
(Donacis : S<sup>o</sup> L. Varendonck, Gento).
94. *Gvidlibreto pri Brugo*, ilustrita, de E. Van Weyenbergh.  
(Donacis : S<sup>o</sup> A. J. Witteryck, Brugo).
95. *Antverpeno*, gvidlibreto ilustrita.
96. *Hastings kaj St-Leonards*, gvidlibreto ilustrita.  
(Donacis : S<sup>o</sup> J. H. Fitton, Huddersfield).
97. *Ondoj*, literaturo de A. E. Styler » » »
98. *En la Montoj*, » » » » »
99. *La Avarulo*, literaturo. Franca verkis : Molière.  
Esperantigis : Sam. Meyer.  
(Donacis : S<sup>o</sup> Alb. Maertens, Gento).

100. *La Supujo*, unuakta komedio : France verkis : Ernest D'hervilly  
Esperantigis : Sam. Meyer.  
(Donacis : S<sup>o</sup> Alb. Maertens, Gento).
101. *L'Esperanto*, monata Genta bulteno; 1<sup>a</sup> jaro, n<sup>o</sup> 8, Augusto 1913.  
n<sup>o</sup> 9, Septembro »

## KOMERCA FAKO.

### Pri disiĝo de Komerca Kompanio.

Gento, la 12<sup>an</sup> de Majo 1913.

Sinjor B...

MARSEILLE.

Sinjoro : Ĉar venis la limtempo de nia Kompanio, ni, agente laŭ la kva ra paragrafo de nia kompania kontrakto havas la honoron anonci al vi, ke de nun ni eniras en la periodon de likvidado.

Ni dankas vin por la plena konfido kiun vi montradis al nia firmo kaj restas viaj servantoj.

J. VERMANDERE kaj K<sup>o</sup> en LIKVIDO.

---

### Ĉesingante la Aferojn.

Bruselo, la 10<sup>an</sup> de Junio 1913.

Sinjoro A. GARCIA,

en BILBAO.

Sinjoro : Tiu ĉi cirkulero celas sciigi vin, ke de nun mi ĉesigas miajn negocojn, pro cedo kiun mi jus faris de mia firmo al miaj filoj Johano, Emanuelo kaj Enriko kiuj prenas sur sin aktivon kaj pasivon. Sekve, volu vi alkalkuli en mia debeto pesetojn 8000. - reston de mia kalkulo kuranta, kaj enŝkribi ĝin en la kredito de miaj nomitaj filoj, sub la nomo Emanuelo Kiata kaj K<sup>o</sup>.

Samtempe mi petegas vin, ke vi volu plene fide al la nova firmo, tiel kiel vi fidis al mi.

Mi dankis vin antaŭe kaj restas via amiko kaj servanto.

J. KIATA.



## Pri Pligrandigo de Fabrikejo.

Gento, la 2<sup>an</sup> de Novembro 1912.Sinjoroj ROBINSON kaj K<sup>o</sup>.

Ni havas la plezuron sciigante vin, ke la pligrandigo de nia fabrikejo estos finita antaŭ la fino de nuna monato, kaj ni tiam povos duobligi nian antaŭan produktadon. Ni ŝparis nenian elspezon por provizi nin per la plej moderna maŝinaro, kaj ni tiel havigis al ni pli delikatan laboron, kaj samtempe pligrandigis nian kapablecon liveri rapide la grandkvantajn mendojn. Ni do senŝanceliĝe povas certigi, ke niaj klientoj, samtempe kiam ili rimarkos la grandan plibonigon de niaj produktaĵoj, rilate al la delikateco, k. t. p., ankaŭ komprenos, ke la estonta plimarkarigo de la fabrikado donos al ni la utilon, ricevi pli bonan artikolon por pli malalta kosto, ol estas proponata de iu el niaj konkurantoj en la komerco.

Ni restas, Sinjoroj,

Viaj Sindonemaj,  
TH. MEYVAERT kaj K<sup>o</sup>.



## Komerca Vortaro.

Appointments-salajro, apport-alporto, approbation-aprobo, arbitre-juĝanto (juĝisto) arbitracia, arbitrage-arbitracio, archives-arhivo, argent (monnaie)-mono, artificiel-arta, artefarita, arrangement-interkonsento, article de commerce-komercaĵo, artikolo, article de fantaisie-fantaziartiklo, avoir-havo, association-societo, associé-kunulo, partoprenanto, assignation-asigno, assortiment-provizo, sortimento, specajaro, assister en personne-ĉeesti persone, assister par représentation-ĉeesti per konfidato, assorti (varié)-diversigita, diversitipa, assurer (à une C<sup>ie</sup>)-asekuri, assurance-asekurado, soigner l'assurance-plenumi la asekuradon, attestation-atesto, augmentation de prix-plialtigo de prezoj, auspices (sous les) - sub la aŭspicoj, autorités (les)-la estraro, authentique-aŭtentika, originala, avis-avizo, sciigo, avis de réception-avizo de ricevo (ricevavizo), avis important! - grava avizo! suivant avis de... - laŭ avizo de..., sans autre avis-sen alia avizo.

La granda sekreto al sukceso konsistas en tio : esti preta kiam la okazo sin prezentas.

## Pensoj kaj Ideoj.

- Bonfarasto devas havi bonan koron kaj malbonan memoron.
  - La batalo inter voli kaj povi plej postulas de la homa forteco.
  - Homo sen pacienco estas lampo sen oleo.
  - La perloj neniam estos niaj se ni timadas subakvigi.
  - Ĝenerale oni diras nur tiam « ke oni lernis koni la homon » kiam oni ĝin vidis je la malbona flanko.
  - Multe da homoj tre bone scias kion ili volas, bedaŭrinde estas ke ili volis tiom ofte ion alian.
  - Honteco estas la filino de l'vereco kaj la fratino de la koncienco.
  - Tragedio de homvivo tre ofte devenas el multaj ŝercoj.
  - Scii kaj precipe voli scii je kia maniero la petanto venas al ni, tre ofte jam sufiĉas por antaŭgardi nin je malvenko.
  - Ŝtelita riĉeco ofte kuras per levita kapo dum honesteco hontas pri sia malriĉeco.
  - Kion ajn oni faru por silentigi la konsciencvoĉon, frue aŭ malfrue ĝi elparolos sian juĝon kaj oni devos ĝin aŭdi.
  - Kiu ne plenumas promeson iĝas malestiminda; kiu ne plenumas minacon iĝas ridinda.
  - Ne tiu kiu malmulte posedas estas malriĉa sed tiu kiu multe deziras.
  - Oni estis feliĉa nur en tia ĉirkaŭantaro kie oni sin sentas hejme.
  - Bonfari estas devo kaj ĝuo, sed bonfaradi estas malfacila batalo.
- Estas kvazaŭ la homoj celas timigi tiujn kiuj volas la bonon. Malgraŭ ĉio daŭrigadi oni devas, atendi, kiel nura rekompenco, la propran kontentiĝon kaj duoble ŝati la dankemon de kelkaj.
- Rimedo estas plifeliĉigi iom ĉiutage estas : plibonigi.
  - Ju pli severa vi estas kontraŭ vi mem, des pli cedema vi estas kontraŭ aliaj, ĉar vi scias kiom kostas al vi restadi bona.
  - La bonfaremo estas emo natura, emo al amo kaj kompatato kontraŭ niaj proksimuloj.

E. COLYN.

Havebla ĉe la Redaktejo :

En vente au bureau de la Rédaction :

Te verkrijgen op het bureau van het Tijdschrift :

Sprakleer en Oefeningen der Hulpwereldtaal

## ESPERANTO

— door MICHEL SEBRUYNS. —

Prezo : 1 franko, poŝtmandate au kontraŭ poŝtmarkoj.

Prix : 1 franc, contre mandat ou timbres-poste.

Prijis : 1 frank, tegen mandaat of postzegels.

## Kolektado :

S<sup>o</sup> G. Vermandere, rue de la Bienfaisance 85. Gento, kolektas fotografajojn de geesperantistoj; li ankaŭ kolektas ĉiuspecajn reklamilojn, (glumarkoj, k. t. p.) por Esperanto.

S<sup>o</sup> M. Sebruyens, Gentstraat, 34, St-Amandsberg (Gento-Belglando) serĉas en ĉiu lando korespondanton, kiu konsentus sendi al li NE-ilustritajn poŝtkartojn, kartleterojn, banderolojn de ĵurnaloj kun surprisitaj poŝtmarkojn, unuvorte ĉion, kion oni nomas « tutajoj ». Interŝanĝe li sendos ĉion, pri kio la korespondantoj petos. Respondos ĉiam kaj tuj.



## INTERŜANĜADO.

(Sub tiu-ĉi rubriko, ĉiu membro povas fari proponon pri interŝanĝado de Poŝtkartoj ilustritaj, Poŝtmarkoj, Leteroj, Ĵurnaloj, k. t. p.)

Deziras korespondadi kaj interŝanĝi ilustr. p. k. aŭ p. m, nur kun fremduloj :

S <sup>ro</sup> <i>Georges Defawe</i>	42, Rue Quinaux,	Bruxelles.
Fino <i>Irma De Vlioger.</i>	15, Place de l'Ecluse,	Gand.
» <i>Fouquet,</i>	28, Rue du Mouton,	id.
» <i>Schepens.</i>	14, Rue Ch-Louis Dierickx	id.
» <i>O. Standaert</i>	66, Rue Savaen	id.
» <i>Suz. Van Hyfte,</i>	228, Rempart de la Biloque,	id.
» <i>Claire Verschueren</i>	91, Rue Joseph Plateau,	id.
» <i>Valerie Sallmann</i>	Schönbüchlerstrasse, 16	Schonlinde (Austrio)
S <sup>ro</sup> <i>Georges Dezutter,</i>	76, Pêcherie,	Gand.
» <i>Ernest Simonis,</i>	55, Rue des Entrepreneurs	Mt-St-Amand. (Gand)
» <i>Flor. Van Cleemput,</i>	137, Bd. de la Citadelle,	Gand.
» <i>Vermandere,</i>	85, Rue de la Bienfaisance,	id. nur I. P.
» <i>Jozef Henke,</i>	Zittauerstrato (Saksujo)	Neugersdorf P. I. respondas tuj.
» <i>Otto Geier,</i>	E. G. Hoffmannstrato 243,	» » »
» <i>R. Wohlstadt,</i>	Feldstrasse 17 <sup>1</sup> , Kiel [Germanujo]	» » »

ĈE LA REDAKTEJO : oni akceptas tre dankeme poŝtmarkojn, ne nur maloftajn por kolektado, sed ankaŭ ĉiuspecajn; ankaŭ ne-ilustritajn poŝtkartojn, banderolojn por Ĵurnaloj kaj kartleterojn. Oni sendos interŝanĝe ĉion pri kio oni petos (ilustritajn poŝtkartojn, ĵurnalojn, librojn, k. t. p.)

Timbres-poste de tous pays à prix réduits.

J'envoie gratis et franco mes prix-courants. Contre envoi de 500-1000 timbres assortis, j'envoie la même quantité en timbres d'Espagne.

R. ALVAREZ MORALES

Strachan 24.

MALAGA (Espagne.)